Teorio pri la konstruado de la vortoj en esperanto (*Antido: La construction logique des mots en espéranto; Antido: La logika bazo de vortfarado en esperanto; Resumo de la teorio de Antido.*). So Antido (prof. René de Saussure el Génève) esploris kaj analizis la kunmetitajn vortojn esperantajn kaj provis aposteriore trovi la principojn ĝenerale uzatajn por kunmetado de vortoj en esp. kaj science formuli, sistemigi ĉi tiujn principojn. La rezultaton de sia studado li prezentis en sia franca verko »La construction logique des mots en espéranto«. (La logika konstruado de la vortoj en esperanto), en kiu li penas pruvi, ke esperanto ne bezonas logikan sistemon de derivado, ke esperanto estas la sola lingvo, en kiu la senco de la vortoj dependas de la vortoj mem, ne de arbitraj reguloj pri derivado, sekve, ke la konstruada sistemo de esperanto estas pli racia kaj praktika ol derivada sistemo de ido; kaj li penas pruvi, ke oni devas klasi ĉiujn vortelementojn (radikojn, afiksojn, finiĝojn) laŭ la kvar ĝeneralaj ideoj entenataj en ili kaj konstrui la vortojn tiamaniere, ke en ili estu ĉiuj elementoj necesaj kaj sole la elementoj necesaj por klare kaj plene esprimi la ideon de la vorto. La principojn de sia teorio la aŭtoro koncize kaj klare resumis en sia propono al »Esperantista akademio«, en kiu li proponas al la esperantistaro la regulojn, kiel logike analizi la vortojn kaj kontroli ilian sufiĉon. Tiu ĉi propono aperis (esperante) antaŭe en la gazeto »Internacia scienca revuo«, poste en la broŝuro »La logika bazo de vortfarado en esperanto«, kiu bone klarigas la tutan teorion de Antido. La propono de Antido estis priparolita de multaj esperantistoj kaj idistoj kaj la aŭtoro publikigis ĉiujn kritikojn kaj klarigojn kun siaj respondoj en la revuo »Svisa espero« kaj en la broŝuro »Resumo de la teorio de Antido«. La teorio de Antido estas rimarkinda kiel pro sia scienca karaktero tiel pro siaj praktikaj konsekvencoj. So Antido vere lerte kaj sagace klarigas multajn faktojn kaj deduktas el ili siajn principojn, kaj la apliko de lia teorio efektive grandparte (tamen ne ĉiam kaj ne plene) kondukas al la sama rezultato kiel la ĝisnuna praktiko de la plejmulto da bonaj verkantoj kaj tradukantoj. Estas vere mirinde, kiel tiu ĉi teorio, kun kies detalaĵoj oni povas ne ĉiam konsenti, donas veran utilon en praktika uzado de la lingvo, la utilon, kiun oni devas sendispute ŝati. Kiu observas la ridindan penon de multaj aŭtoroj, precizigi ĉiun vorton per ĉiuj eblaj, senbezonaj elementoj,

kiu vidas tro oftan, sencelan uzadon de komplikitaj kaj malsimplaj formoj (vidu ekzemple ĉe ni la metodon de Kühnl, la tradukon de »La avineto« k. s.), kiu tiom malbeligas la literaturan lingvon, tiu plezure bonvenigos kaj akceptos la konsilojn kaj proponojn, kiel forigi el la lingvo senutilan kaj nenecesan balaston, eĉ se li ne povos akcepti la tutan teorion. Serioza kaj originala studaĵo de Antido estas unu el tiuj verkoj, kiujn oni povas legi kun intereso, eĉ se oni ne konsentas kun prezentita teorio, kaj kun utilo, eĉ se oni ne aprobas proponitajn principojn. Tial la verkoj de Antido estas interesplena kaj rekomendinda legaĵo ne sole por mallarĝa sfero de tiuj esperantistoj, kiuj ne kontentiĝante sole per la praktikaj posedo kaj uzo de la lingvo deziras ankaŭ koni la teoriajn principojn, penetri pli profunde kaj intime la strukturon kaj mekanismon de la lingvo, sed ankaŭ por larĝa sfero de ĉiuj esperantistoj, kiuj penas pri simpla kaj facila esprimado de siaj ideoj. Kvankam la teorio de Antido ne havas ĝeneralan kaj absolutan valoron kaj ne povas ricevi oficialan leĝoforton, tamen ĝi meritas la ĝeneralan atenton, precipe de ĉiuj verkantoj kaj tradukantoj. — Ni bedaŭras, ke mankas al ni tempo kaj loko por detala kritiko pri la teorio de Antido; eble la cirkonstancoj permesos al ni pli poste priparoli la verkon. Ni almenaŭ donis la resumon de la verko (en la rubriko »Problemoj kaj opinioj«) rekomendante al tiuj, por kiuj ĝi ne sufiĉus, legi la verkon mem. *Bšk.*

Pri la rilato de D-ro Zamenhof al la f-mo Hachette oni ofte parolis kaj skribis diversajn kaj strangajn historiojn. Tio devigis d-ron Z. publike klarigi la aferon (en »Oficiala gazeto esperantista«, jk. III., kj. 8., pĝ., 251). Ni resumas mallonge lian klarigon por tiuj, kiuj interesiĝas pri tiu ĉi persona afero de la kreinto de esperanto. Inter Zamenhof kaj Hachette ekzistas sole kontrakto, per kiu d-ro Zamenhof promesis publikigi ĉiam siajn librojn (sekve ne gazetajn artikolojn aŭ ion similan) per la firmo Hachette; tiun kontrakton Z. subskribis post longa hezito tial, ĉar esperanto »tiam tre bezonis la apogon de iu solida firmo«. H. pagas al Z. sole aŭtoran honorarion pro liaj personaj verkoj (sekve ne procenton de ĉiuj esperantaj eldonaĵoj aŭ salajron) kaj li pagas nenion pro la verkoj de Z. eldonitaj kiel represaĵo el »La Revuo« en formo de libroj (Z. mem propravole rifuzis grandan pagon proponitan de H., ĉar la enspezoj de »La Revuo« ne povis kovri la elspezojn por eldono). Inter Zamenhof kaj la direktoro de »La Revuo« ekzistas sole libere kaj sen iu kontrakto donita promeso de Z., ke Z. publikigos en ĉiu numero de »La Revuo« parton de siaj tradukoj (sekve ne promeso publikigi la artikolojn ekskluzive en »La R.«), pro kiuj la eldonanto pagas al Z. aŭtoran honorarion kaj per tio donas al li la eblon plibonigi la vivon de lia familio kaj veturadi ĉiujare en la kongresojn. Konklude Z. povas publikigi siajn librojn ekskluzive per la firmo Hachette, kiu pagas al li sole honorarion, sed li povas publikigi siajn artikolojn en kiu ajn gazeto estante neniel ligata verki sole kaj ekskluzive por »La Revuo«. Per tiu ĉi klarigo d-ro Z. volas montri, ke li ne havas intereson zorgi pri la profitoj de f-mo H., ke li ne estas ligitá kun la f-mo H. rifuzadi la reformojn, ke la kontrakto inter li kaj H. neniel povas influi la iradon de l' esperanta afero. La legantoj vidas, ke la fakto — de multaj bedaŭrata kaj riproĉata — ke oni povas legi la verkojn de Z. sole kaj ekskluzive en unu revuo, ke la nomo de la plej grava kaj plej ŝatata persono en la movado estas reklamilo por unu je malutilo de la aliaj, estas kaŭzita simple per tiu malĝoja fakto, ke la aliaj gazetoj ne povas laŭmerite rekompenci la verkojn, kiujn d-ro Z. faras en la tre malmultaj horoj, kiujn li devus uzi por ripozo aŭ por sia familio. Ni sole raportas pri tiu ĉi afero por informi la legantojn; estas malfacile paroli kaj juĝi pri tiel privataj kaj intimaj aferoj. *Hkb.*

KRONIKA A KOMENTÁŘ.

Slepci a esperanto. K lidem, pro něž esperanto má obrovský, přímo epochální význam, patří slepci. Bez nadsázky možno říci, že pro slepce je esperanto opravdovým dobrodiním, požehnáním, zvláště pro slepce národa malého. Pro ně esperanto znamená epochální prostředek k rozšíření duševního obzoru, k vyvinutí duševního života v míře možně největší. Pro slepce každého národa, ale zejména národa malého, jsou pomůcky k duševnímu vývinu velice omezené: knihy pro slepce jsou velice obsáhlé, náklad jich je poměrně malý, proto knih pro slepce, kteří jsou pravidelně chudí, je málo a jsou drahé (na př. čeští slepci dlouhá léta měli jen několik, asi 10 nebo 20 knih, a ještě dnes, kdy úmornou a obětavou prací pana Macana, slečny Tesařové a jiných se poměry zlepšily, mají jich — určitě nevím, ale mnoho asi nechybím — sotva sto; slyšte: sotva sto knih z celé literatury všech národů, dob, odborů, a to jsou ještě knihy psané, existující v jednom neb jen v několika exemplářích; zda jsou nějaké tištěné knihy pro slepce české ani nevím, pochybuji však). Přirozeno, že knihy tištěné v esperantu pro slepce celého světa budou levnější a tudíž přístupnější a co hlavního, že literatura slepecká bude bohatší; i chudý slepec malého národa bude míti výběr knih, výběr větší ještě, nežli jaký mají dnes slepci národů velkých (zejména slepci němečtí). Slepci různých národů, sblížení stejným neštěstím a stejnými snahami, nemají téměř možnosti navazovati mezi sebou styků; pravidelně mají málo času (většinou vydělávají si hmotnou prací), aby se mohli naučiti, byť jedinému nesnadnému jazyku, a hlavně nemají dosti pomůcek: mluvnice nebo slovník nějakého jazyka, vydaný jako kniha pro slepce (vypouklým písmem na př. Braille-ovým), je úžasně veliký balík. Naproti tomu esperantu naučí se slepec velice snadno, pomůcky nejsou příliš objemné a drahé a slepci umožní se styk s celým světem. A co to znamená pro lidi, jichž styky jsou neskonale omezeny jich slepotou, je těžko vylíčiti slovy; zajděte si mezi slepce-esperantisty do Klárova ústavu, abyste viděli jich radost z toho! Proto od několika let je zvláště podporována propaganda esperanta mezi slepci, zejména zavádění jeho na školy pro slepce. Výsledek dosavadních snah je dosti pozoruhodný. Slepci-esperantisté mají nyní svoji tiskárnu (v Amiens), kde vytištěno již množství učebnic, slovníků a povídek a kde se tiskne měsíční revue pro slepce (tisk obstarává slepý sazeč Couillard, učitel na ústavě slepců v Amiens). Vytištěna je Zamenhofova cvičebnice (Ekzercaro), anglická, francouzská a německá učebnice (mluvnice, cvičebnice, slovníček, slovník (3500) esperantských kořenů (Esperanta radikaro) a jeho překlad francouzský, německý a anglický. Rukopisně provedeny jsou velké části některých význačných esp. spisů (Krestomatio, Prozaĵoj, Hamlet, Kain, Diversaĵoj, Kvar tagoj, Aŝik Kerib, Monadologio a j.). Měsíčník pro slepce (Esperanta ligilo = Esperantské pojítko; měsíčně 32 str., roč. předplatné 3 K) existuje od května r. 1904; má nyní 300 předplatitelů z více než 20 zemí (ukázkový sešit zašle za dva mezinárodní kupony na odpověď — 50 hal. — (Presa societo esp., Paris R. Lacépède 33). Esperantu učí se na některých ústavech slepců ve Francii (Paříž, St. Mandé, Dijon), Belgii, Čechách (Praha), Dánsku (Kodaň), Švédsku (Tomteboda-Stockholm), Anglii (Boston) a j. Slepci esperantisté měli už také svoji mezinárodní schůzku: na mezinárodním sjezdu esp. v Cambridge bylo asi 20 slepců sedmi národů, kteří zde po 8 dní hovořili jen esperantem, ač někteří z nich začali se učiti esperantu 5 až 6 měsíců před tím. Esperantisté propagandu tu podporují jednak dary peněžními (přijímá je prof. Th. Cart, Paris, rue Soufflot 12) — byla uspořádána i loterie ve prospěch propagandy esp. mezi slepci — a kupováním knih, prodávaných ve prospěch slepců, jednak tím, že jednotlivci, cítící

se slepci a mající pokdy, přepisují pro ně knihy (tomu lze se naučiti snadno a brzy), jednak tím, že jim chodí na nějakou hodinku předčítat z knih a časopisů nebo je chodí učit esperantu (kdo by z čtenářů našich chtěl pro české slepce přepisovati české neb esperantské knihy nebo kdo z pražských čtenářů chtěl by slepcům předčítati, učiti je, nechť to sdělí na adresu: Em. Macan, učitel, Praha III., Klárův ústav). Uvážíme-li význam esp. pro slepce, uznáme, že propaganda esp. mezi slepci je záslužnou prací filantropickou. *Bsk.*

„Svaz českých esperantistů" při uvítání londýnského lordmayora sira Vezey Stronga na radnici staroměstské — k němuž pozván byl přípisem praesidia rady král. hlav. města Prahy — zastoupen byl svým místopředsedou p. radou K. Biskupem. *Sch.*

Učebnice esperanta do žákovských knihoven středoškolských. »Svaz českých esperantistů« zaslal 150 českým školám středním (gymnasiím, reálkám, paedagogiím, průmyslovkám atd.) v Čechách a na Moravě po výtisku »Úplné učebnice esperanta« od Th. Čejky a Josefa Krumpholce s žádostí, aby učebnice byla zařaděna do žákovské knihovny a aby studenti byli na ni upozorněni. Téměř na všech ústavech bylo žádosti svazu ochotně vyhověno, z několika ústavu na přípis svazu (v němž vylíčeno bylo rozšíření esp. na školách) bylo odpověděno i sympatickým přípisem. Jenom ředitelé 12 ústavu odepřeli žádosti vyhověti a zásilku vrátili (ač adressována na professorský sbor!). Stůjž zde pro trvalou paměť seznam ústavů, které mají tak přemoudré, rozhledem po světovém ruchu vynikající pány ředitele, že ve své povznešené domýšlivosti nepřijali ani knížky darované; jsou to gymnasia v Rokycanech a Brně (první české) reálky v Praze (Ječná), Kutné Hoře, Jičíně, Rakovníku, Kladně a Českých Budějovicích a konečně mužské paedagogium v Kutné Hoře a ženská paedagogia v Praze (sv. Anny), Chrudimi a Brně. Nu, tuhle nepřízeň esperanto přežije lehce, tím lehčeji, že na ostatních 138 českých středních školách dar svazu bude konati své poslání a jistě ponese ovoce. *Hkb.*

„Rudá brožura o esperantu, jak pojmenována byla (dle rudé obálky) pěkná methodická propagační učebnice anonymního profesora pařížského, vyšla již v osmi jazycích: anglicky, bulharsky, česky, flandersky, francouzsky, německy, polsky a rumunsky. České vydání zpracovali Th. Čejka a Jos. Krumpholc a vydal je Th. Čejka (Bystřice Hostýn, Morava) bez slovníčků pod názvem »Malá učebnice esperanta« (za 20 hal.), se slovníčky pod názvem »Methodická učebnice esperanta (za 70 hal., váz. K 1·20). Oblíbenost, jaké se tato knížečka těší, svědčí nejlépe o její ceně. *Nemo.*

Cizí esperantisté v Praze. V poslední době měli esperantisté pražští potěšení uvítati mezi sebou několik esperantistů mimorakouských a pohovořiti si esperantsky s cizinci. Z Ameriky byl tu Ernest Mc. Kelvey, chemik z Chicaga, a český vystěhovalec Dr. B. K. Šimonek, lékař z téhož města. Ze Srbska zavítal k nám inž. Dragomir M. Andonovič, universitní docent z Bělohradu, z Uher navštívil Prahu Otto Amon, poštovní úředník z Koloszvaru, z Ruska byl tu návštěvou Dr. J. Ostrovski, lékař z Jalty, z Německa přišli K. Steier, redaktor z Lipska, a E. Werner, pošt. asistent ze Siegmaru (v Sasku). Milým hostům k službám byli delegát U. e. a. pan přednosta Kraus a členové Čes. společnosti esp., kteří se snažili, aby pobyt v Praze zanechal hostům milou upomínku. Že se jim to zdařilo, svědčí děkovné přípisy, zaslané hosty po návratu domů. *Nemo.*

Němečtí esperantisté pražští utrpěli velikou ztrátu úmrtím zakladatele a předsedy svého spolku »Esperanto-Verein Verda stelo Prag«, prof. Siegfrieda Lederera, redaktora esperantských časopisů »Uni-

verso« a »Rund um die Welt« a ročenky »Esperantista Poškalendaro«, který zemřel náhle 8. září 1911. Nemajíce bohužel místa k ocenění tohoto pracovitého průkopníka našeho hnutí, který s procítěním sledoval také události mezi esperantisty českými, omezujeme se na upřímný projev vřele cítěné soustrasti vážené rodině a spolku »Verda stelo«. Budiž čest památce profesora dra Lederera! *Redakce.*

C. k. ministerstvo veřejných prací „Svazu česk. esp." oznámilo (výnosem ze dne 17. května 1911 č. 48.), že žádosti svazu za vyslání oficielního zástupce vlády na VII. sjezdu esp. v Antverpách nemůže sice vyhověti z důvodů služebních, že však by vítalo uspořádání takového sjezdu v některém městě rakouském, a zásadně bylo by ochotno, podnik takový podporovati. K vyplnění tohoto slibu, daného svazu, bude míti ministerstvo příležitost již roku příštího, kdy konán bude VIII. sjezd esp. v Krakově.

Zastoupení král. hlav. města Prahy na světovém sjezdu esperantistů v Antverpách svěřila městská rada místopředsedovi »Svazu čes. esp.« p. úč. radovi K. Biskupovi. Zajímavo jest, že pověřovací listina, podepsaná starostou drem Grošem, byla vyhotovena také esperantsky, kterážto okolnost vzbudila živou pozornost sjezdového předsednictva a i účastníků. To jest již podruhé, kdy na popud »Svazu čes. esp.« město Praha bylo oficielně zastoupeno na mezinárodním sjezdu esperantistů: poprvé stalo se tak r. 1909 na V. sjezdu v Barceloně, kdy zástupcem města Prahy byl rovněž p. rada K. Biskup. *Sch.*

Kursy esperanta pro české učně zavedeny byly na podnět předsedy »Čes. společnosti esp.« za účinné podpory spisovatele p. J. Dolenského, ředitele školy »U svaté Trojice«, a se schválením městské rady pražské v učňovské besídce při pokračovacích školách pražských. Kursy konají se dvakráte týdně ve škole »U sv. Trojice« (Vladislavova ul.). Kurs pro hochy vede p. H. K. Bouška, pro dívky pí. Mat. Krausová. *Hbk.*

Sedmý mezinárodní sjezd esperantistů konal se ve dnech 20. až 27. srpna t. r. v Antverpách za ohromné účasti 1738 osob. Byl to první sjezd, na němž esperantisté byli zastoupeni zvolenými zástupci. Delegátem »Svazu českých esperantistů« byl místopředseda pan úč. rada K. Biskup, který disponoval 33 hlasy (1 hlas připadl na 25 organisovaných esperantistů), byv zvolen — ve smyslu známého návrhu dra Zamenhofa — za »rajtigita delegito« četnými spolky nejen svazovými, ale i mimosvazovými. — (O sjezdu přinese zprávu 1. číslo VI. ročníku »Čes. esp.«). *Sch.*

Náboženské obřady v esperantu. V Sydney konala se v unitářském kostele mše v esp. V Monacu uspořádal spolek esp. slavnost spojenou se mší, při níž předseda spolku pater Pichot měl esp. kázání. *Hmd*

České spolky a esperanto. Výbor »Okrašlovacího spolku města Bystřice p. H.« navrhl »Svazu pro povznesení návštěvy cizinců na Moravě a ve Slezsku,« aby věnoval pozornost esperantu.

ZPRÁVY SPOLKOVÉ.

Klub českých esperantistů v Olomouci na své valné hromadě (9. X. 11.) pojednav o svém poměru k oběma ústředím českých esperantistů, usnesl se přistoupiti za člena »Svazu čes. esp.« Oficielní zprávu otiskneme v čísle příštím. *Rd.*

P. t. pp. členové Svazu Č. E., kteří nám doposud členský příspěvek za rok 1910—1911 nezaplatili, žádají se, aby tak co nejdříve učinili. Správní rok ukončil již v červnu. Uspořte nám drahého času s upomínáním a peněz za známky na upomínky! — Jan Iglauer, t. č. pokladník.

LIBROJ KAJ GAZETOJ.

Kroata esperantisto (II, 9—12) sciigas, ke en la nuna jaro okazos la kongreso de apuddanubaj esp. en Zagreb. *H.*

La Ondo de esperanto (II, 11) sciigas: »Russkoje slovo« (Moskva) kaj »Birževija Vědomosti« (Petersburg) notis, ke la glora verkisto *P. D. Boborikin* ellernis esperanton en la daŭro de unu semajno (B. V. 11.970). Estas interese, ke s-o B. konas 7 lingvojn »naturajn«, tamen li fiksis la atenton ankaŭ al nia artlingvo kiel L. Tolstoj. *H.*

Esperanta penso. Organo de esperantistaj laboristoj el *Esperanta ekskursa societo* Adr.: Santiago (Chile), Casilla 2850. Abonprezo Sm 1·50. — La gazeto estas grandparte hispana. Estas mirinde, ke eĉ la artikolo pri »salvarsán« estas hispana! Tion ni ne komprenas. *H.*

Hungara studento (II, 3) asertas, ke ĝi havas preskaŭ mil abonintojn inter la gestudentaro. *H.*

Esperanto-Folket. Propagandaorgan för Esperantismen i Svege. Red. & adm.: G. H. Backman, Hälsingborg, Svedujo. Jarabono Sm 1·50. — Grandformata dulingva gazeto por la propagando de esp. inter Svedoj. El la enhavo de la 2a n-o (I. jk.) estas leginda vizio de K. P. Arnoldson »La preĝo de papo«. *H.*

Riga stelo (Звѣзда риги). Monata organo dediĉita al la praktika uzado de esperanto. Adr.: Riga, Krebstr. 11. Jarabono Sm 1·50. — Ni ne legis la programon de tiu ĉi rus-esperanta gazeto (ĉar ni ne ricevis la 1an n-ron), sed juĝante laŭ la 2a al ni sendita n-ro oni povas diri, ke la gazeto estas bone redaktata de lertaj laborantoj. En la ricevita n-ro estas inter aliaj artikoloj la parolo de D-ro L. L. Zamenhof dum la malfermo de la I. ruslanda esperantista kunveno en Petersburg (4. V. 1910). *H.*

Helpa lingvo (Lengua auxiliár). Revista mensual para la propaganda de la lengua internacional esperanto. Red. & adm.: Córdoba (Rep. Argentina), Colón 88. Jara abonprezo Sm 1·00. — Hispan-esperanta monata revuo por Suda Ameriko, precipe Argentino. En la gazeto estas konstanta rubriko »Amerikaj literaturaj juveloj« enhavanta tradukojn el la verkoj de amerikaj literaturistoj. *H.*

Germana esperantisto (VIII, 1) prave rekomendas al la germanaj esperantistoj subteni la batalon por unu skribmaniero (latina); ankaŭ en aliaj landoj, kie oni ankoraŭ ne forĵetis la abomenan kutimon skribi per speciala skribmaniero (germana, rusa, greka, japana ktp.) la esperantistoj devus subteni la propagandon pri enkonduko de la latina skribo; jam per tio ili sufiĉe preparus la vojon por esperanto (se oni ne parolas pri aliaj bonaĵoj rezultantaj el la unueca skribo). *H.*

Pri la ricevitaj libroj kaj gazetoj, kiujn ni ne povis priparoli en la nuna jarkolekto pro manko da loko, ni raportos en la venonta jarvolumo. Ni petas la indulgon de l'aŭtoroj, eldomintoj kaj legantoj.

Zodpovědný redaktor H. K. Bouška. — Nakladatel Jan Iglauer.
Tisk »Politiky« v Praze.

Strany 159-184 chybějí, ale asi se nejedná o ztrátu, protože i v úvodním seznamu není zmínka o těchto stranách, pouze až o 188 a 187.

PŘEHLED OBSAHU.
TABELO DE L' ENHAVO.

ČLÁNKY ČESKÉ.

ARTIKOLOJ ESPERANTAJ.

POEMOJ ESPERANTAJ.

PROBLEMOJ KAJ OPINIOJ.

Abomena perforto inter esperantistoj (Nova dokumento pri la perfortemo de s-o Ed. Kühnl). Ni devas sciigi al la esperantistaro vere nekredeblan fakton, pri kiu ĝi certe legos kun la plej granda abomensento. Jen, kio okazis: La lastjara unua kongreso de l'aŭstriaj esperantistoj decidis, aranĝi la duan kongreson en Praha, kaj ĝi komisiis (malprave) unu el du centraj organizaĵoj de la bohemaj esperantistoj, »Boheman union esperantistan«, prepari tiun ĉi manifestacion. Bohema unio esperantista efektive anoncis, ke ĝi preparas la kongreson kaj per publika alvoko ĝi sola invitis, partopreni en la kongreso (konferenco) per la vizito kaj paroloj. La alia centro de la bohemaj esperantistoj, »Bohema asocio esperantista«, kvankam grave ofendita per tio, ke ĝi ne estis kunaranĝanto de la kongreso, decidis, partopreni en la kongreso per grandnombra vizito de siaj membroj kaj per paroloj de tri siaj komitatanoj, de la prezidanto (prof. dr. Stan Kamaryt: La signifo de esp. por la aŭstriaj nacioj), ĝenerala sekretario (financa komisario Mil. Schmidt: Organizaj principoj de l'esperantisma movado) kaj unua sekretario (profesor-kandidato H. K. Bouška: Komuna organo de l'aŭstriaj esperantistoj). La delegitaj parolantoj de la Asocio sendis al la Unio — ĉar ĝis nun ne estas konata la prepara komitato de la konferenco — sian aliĝon kaj anoncis siajn parolojn. S-oj Bouška kaj Kamaryt responde ricevis pere de advokata kancelario rekomenditajn leterojn, kiujn ni enpresas en bohema originalo (kun ĉiuj — multaj — ortografiaj, gramatikaj kaj stilaj eraroj kaj kriplaĵoj) kaj en fidela esp. traduko. Jen la teksto de tiuj gravegaj dokumentoj pri tio, kian spiriton kaj kiajn morojn vastigas inter la bohema esperantistaro s-o Eduard Kühnl:

V Praze 12. srpna 1911. Panu Ph.Dr. Stan Kamarytovi ve Velešíně. — Bylo mi uloženo funkcináři Ústředního svazu českých esperantistů Bohema Unio esperantista odpověděti na Váš doporučený dopis z Velešína ze dne 3. srpna 1911. takto: — Vzhledem ke způsobu Vašeho vystupování proti snahám a pracím Ústředního svazu a proti jeho funkcionářům, o němž se šíře zmiňovati není mou úlohou a který je Vám zajisté dobře znám a p.o který jsou četné doklady zde, usneslo se komité sjezdové, nepřijmouti Vaši přihlášku ku sjezdu i s oznámenou Vaší přednáškou a obnos 1 K zaslaný na legitimaci sjezdovou: Konference rakouských esperantistů Vám vrátiti. — O tom Vám dávám věděti a obnos 1 K Vám zasílám ve známkách poštovních zpět. — S veškerou úctou se znamenám Dr. Nevšímal.

V Praze, 20/VIII. 1911. Panu Hynku Bouškovi, redaktoru měsíčníku »Český esperantista« na Smíchově. — Dopisem svým ze dne 14. srpna 1911 ráčil Jste Unii Českých

En Praha la 12an de aŭgusto 1911. Al sinjoro PhDr. Stan Kamaryt en Velešín: — Mi estis komisiita de la komitatanoj de la Centra asocio de bohemaj esperantistoj Bohema unio esperantista respondi Vian rekomenditan leteron el Velešín de la 3. de aŭg. 1911. tiel: — Rigardante la manieron de Via konduto kontraŭ la penoj kaj laboroj de la Centra asocio kaj kontraŭ ĝiaj komitatanoj, pri kiu pli detale paroli ĉi tie ne estas mia tasko kaj kiu estas al Vi certe bone konata kaj pri kiu troviĝas multenombraj dokumentoj ĉi tie, la kongresa komitato faris decidon, ne akcepti Vian aliĝon al la kongreso kune kun Via anoncita parolo kaj redoni al Vi la sumon de 1 K sendita por kongresa legitimacio: Konferenco de l'aŭstriaj esperantistoj. — Pri tio mi sciigas Vin kaj mi resendas al Vi en poŝtmarkoj la sumon 1 K. — Kun plena respekto mi subskribas min Dr. Nevšímal.

En Praha, 20/VIII. 1911. Al sinjoro Hynek Bouška, redaktoro de la monata revuo »Bohema esperantisto« en Smíchov 730. — Per sia letero de la 14a de aŭgusto 1911

Esperantistů sděliti, že na letošní konferenci rakouských Esperantistů přednesete referát pod názvem: »Společný orgán rakouských Esperantistů«, a žádal Jste, aby referát tento zařaděn byl do programu sjezdu a aby Vám oznámeno bylo, kdy na tento referát dojde. — Funkcionáři »Ústředního Svazu Českých Esperantistů Bohema Unio Esperantista« bylo mně uloženo zděliti Vám usnesení sjezdového komité, nepřijmouti Vaši přihlášku ke konferenci rakouských Esperantistů, jakož i zamítnouti ohlášený referát »Společný orgán rakouských Esperantistů«, nejen vzhledem ku způsobu Vašeho vystoupování proti úspěšným snahám a pracem »Ústředního Svazu Českých Esperantistů«, ale i pro soustavné napadání a urážení předních a zasloužilých funkcionářů, jako pp. professora D-ra Rosického, odb. uč. Svačiny a Jeřábka, Inž. Fr. Kühnla a Ed. Kühnla, redaktora »Časopisu Českých Esperantistů«, p. Procházky, Tobka a mnohých jiných ve Vašem měsíčníku »Český Esperatista«, dále pak pro znehodnocování a snižování činnosti spolků v Unii sdružených — kterážto Vaše činnost jest obecně známa, a propagační nazvána býti nemůže, jak toho zájem a důstojnost sjezdu vyžadují. — Dávaje Vám o tomto usnesení věděti, znamenám se Vám s úctou D-r Aug. Nevšímal.

Vi bonvolis sciigi al Bohema unio esperantista, ke en la nunjara konferenco de l' aŭstriaj esperantistoj Vi prezentos raporton kun titolo »Komuna organo de l' aŭstriaj esperantistoj«, kaj Vi postulis, ke tiu ĉi referato estu envicita en la programon de la kongreso, kaj ke oni sciigu al Vi, kiam venos la vico de la raporto. — La komitatanoj de la centra asocio Bohema unio esperantista komisiis min, sciigi al Vi la decidon de la kongresa komitato, ne akcepti Vian aliĝon al la konferenco de l' aŭstriaj esperantistoj, kaj same malakcepti la anoncitan raporton »Komuna organo de l' aŭstriaj esperantistoj«, ne sole pro la maniero de Via konduto kontraŭ la sukcesplenaj penoj kaj laboroj de la centra asocio Bohema unio esperantista, sed ankaŭ pro la sistemaj atakoj kaj ofendoj de la ĉefaj kaj meritplenaj komitatanoj, ekzemple de s-oj prof. dr. Rosický, fakinstruistoj Svačina kaj Jeřábek, inĝ. Fr. Kühnl kaj Ed. Kühnl, redaktoro de »Čas. čes. esp.«, s-o Procházka, Tobek kaj multaj aliaj en Via monata revuo »Bohema esperantisto«, plue pro la malindigado kaj malaltigado de l'agado de la societoj grupigitaj en la Unio — kiu Via agado estas universale konata kaj ne povas esti nomata propaganda, kiel tion postulas la intereso kaj majesto de la kongreso. — Sciigante al Vi tiun ĉi decidon mi subskribas min respektplene Dr. Aug. Nevšímal.

Sekve: »Bohema unio esperantista«, propre s-o Ed. Kühnl, uzurpas por si la rajton fari decidojn pri tio, kiu povas partopreni en la kongreso de l'aŭstriaj esperantistoj ĉu kiel simpla aŭskultanto ĉu kiel parolanto. S-o Kühnl kuraĝas eligadi el la komuna manifestacio de ĉiuj aŭstriaj esperantistoj la personojn, kiuj malplaĉas al li, kiujn li malamas. S-o Kühnl eligas la samideanojn, kiuj volas kaj deziras kunlabori kaj kiuj estas pretaj kaj kapablaj kunlabori. S-o Kühnl malbonuzas la komunan manifestacion por persona venĝo kaj montro de sia malamo! Neniam ie okazis io simila! S-o Kühnl videble volas regi ne sole la tutan boheman, sed ankaŭ la tutan aŭstrian esperantistaron, kaj por atingi tion li ne timas uzi brutalan kaj abomenan perforton, sovaĝan silentigadon de personoj malagrablaj al li. S-o Kühnl ne hontas malsanktigi nian puran aferon per perfortajoj, senkredigi ĝin en la okuloj de la neesperantista publiko per brutalajoj. S-o Kühnl danĝere kompromitas ĉe la ĝentilaj homoj ne sole la boheman, sed la tutan aŭstrian esperantistaron, en kies nomo li praktikas tiajn abomenajn farojn. Kun vera hontsento ni sciigas tiun ĉi nekredeblan, sed veran fakton, al la esperantista publiko, por ke la esperantistaro ĝenerale kaj la aŭstria speciale sciu, en la manoj de kiaj homoj estas la manifestacio de la ideo pri la universala interkompreniĝo kaj kunfratiĝo inter la nacioj! *H. K. Bouška.*

RAPORTOJ KAJ NOTIZOJ.

Pri la ŝovinismo skribis la konata dana kritikisto Georges Brandes en sia felietono verkita por rusa gazeto »Russkoje slovo« (Moskva): »En Rusujo — cetere kiel ĉie en Eŭropo — la nacionalismo plifortiĝas malgraŭ la disvastigado de interrilatoj kaj internacia solidareco. Estas mirinde, ke en neniu lando la nacionalistojn konfuzas la fakto, ke la nacionalismo ĉiulande atingis la saman nivelon. Jam en la antikva epoko nek Grekoj, nek Romanoj, nek Hebreoj iomete dubis, ke ili prezentas la nacion elektitan de la ĉielo. La sama ideo nun renaskiĝas, venkinte la kosmopolitismon de la XVIIIa jarcento. En Usono aperis la dogmo, ke la Usonaj lando kaj popolo estas la unuaj en la mondo, en Japanujo estas tute same, en Ĥinujo ankaŭ, en Anglujo — same, en Germanujo — same, ĉi tie kun aparta klareco. Neniu Italo kaj Greko dubas pri la supereco de sia popolo sole kaŭze de la nacia deveno. Eĉ en la malgranda Danujo ekzistas kredo, ke Danoj estas la plej favorata popolo de dio, ke Danujo estas lando, kiun dio necese bezonas por sia celaro. Kiam belga knabineto foje montris al mi sian geografian lernolibron, mi informiĝis, ke Belgio estas la plej kultura lando de la terglobo, havante la plej densan loĝantaron kaj plej superan industrion — kompare kun la grando de la teritorio. En Kristiania, dum konversacio kun universitata profesoro, mi ŝerce demandis: »En Norvegujo oni povas trovi multe da personoj, opiniantaj la norvegan popolon plej perfekta sole, ĉar ĝi estas norvega — ĉu ne?« Iom konfuzite la profesoro respondis: »Mi devas konfesi, ke mia opinio estas la sama«. (El »Lingvo internacia« XVI, 2, 85). Trad. *B. Kotzin.*

Afranko por respondo en la internacia korespondado (Atentigo). Se oni petas de fremdlanda persono ian informon aŭ servon, estas evidenta devo sendi al la adresato respondan afrankon, ĉu poŝtkarton ĉu poŝtmarkon. Se la adresato estas alilandano, estas senutile sendi al li respondan poŝtan karton aŭ markon de sia lando, ĉar li ne povas uzi ĝin kaj ordinare ne povas ŝanĝi ĝin en banko. Tial por la korespondado fremdlanden ekzistas jam de multaj jaroj specialaj poŝtkartoj por fremdlandaro (unuoblaj kaj duoblaj) kaj de kelkaj jaroj (de 1907) specialaj internaciaj asignoj por respond-markoj (tiel nomataj »internaciaj respond-kuponoj«) Se oni sendas al fremdlanda persono duoblan korespond-karton por la fremdlandaro, sur kies unua karto oni skribis sian korespondaĵon, la adresato povas respondi sur la alia karto. Se oni sendas al fremdlandano leteron kun enmetita internacia respond-kupono, li povas ŝanĝi la kuponon en ĉiu poŝtoficejo kontraŭ sialanda poŝtmarko bezona por afranko (en valoro 25 hel, 25 ctm, 25 pf ktp). Per respond-kuponoj enmetitaj en letero oni ankaŭ povas facile kaj oportune pagi malgrandajn sumojn eksterlanden (unu kupono valoras 25hel = 25 ctm ktp., kvankam ĝi kostas 28hel = 30 ctm ktp.). La internaciaj korespond-kartoj (en Aŭstrio unuoblaj po 10hel, duoblaj po 20h) kaj internaciaj respond-kuponoj (en Aŭstrio po 28hel) estas riceveblaj en ĉiu (en Aŭstrio ekskluzive en) poŝtoficejo. Uzante respond-kuponojn oni devas ĉiam atenti, ke ĝi estu ŝtampita de la poŝto (alie ĝi estas senvalora). Ni spertis, ke grandega mombro da personoj nenion scias pri tiu ĉi grava kaj praktika afero, tial ni sentis la bezon atentigi la samideanojn pri ĝi, sciante, ke la atentigo utilos al multaj legantoj. *Rd.*

Lernolibroj pri esperanto en lernejaj bibliotekoj. »Bohema asocio esp.« donace sendis al 150 mezaj (duagradaj) bohemaj lernejoj — gimnaziaj, realaj, pedagogiaj, industriaj, komercaj — detalan boheman lernolibron pri esperanto (de Čejka kaj Krumpholc) kun la peto, ke oni envicu ĝin en la bibliotekon por lernantoj de l' instituto kaj atentigu la studentojn pri ĝi. La plej granda parto da institutoj plenumis kompleze la deziron de »Bohema asocio

esperantista«, kelkaj eĉ tre afable respondis per speciala letero la petskribaĵon, en kiu la asocio priskribis la disvastiĝon de esp. en la lernejoj. Estas sendube, ke tiuj cent kvindek libroj gajnos multajn junajn adeptojn al nia lingvo kaj helpos al disvastigo de esp. inter la bohema studentaro. Ni plezure raportas pri tio; eble en aliaj landoj oni imitos tiun ĉi ekzemplon. *Bšk*.

PROBLEMOJ KAJ OPINIOJ.

Financa propono de idistoj al Zamenhof. Oni faris al d-ro Zamenhof riproĉon, ke li estas konservativa pro personaj, financaj motivoj, ke li kontraŭstaras la reformojn pro persona oportuneco. Respondante ĉi tiun akuzon (en »Oficiala gazeto esp.« III, 8, 251) d-ro Z. publike malsekretigas la fakton (pri kiu cetere malpublike rakontis informitaj personoj), ke kontraŭe financan profiton povus alporti al li la aprobo de reformoj, aliĝo al reformemuloj (idistoj), ĉar oni penis allogi lin, neriĉan kuraciston, per tre granda sumo da mono, kiu permesus al li tute forĵeti lian profesion, vivi tute oportune kaj feliĉe, kiu liberigus lin de ĉiuj zorgoj pri la morgaŭa tago kaj pri la estonta sorto de lia familio kaj kiu permesus al li fordoni sin plene kaj ekskluzive al siaj amataj idealoj. Al tiu malsekretigo d-ro Z. aldonas rimarkon: »La propono de mono ne estis ia malnoblaĵo de la flanko de la proponintoj, ĉar ili havis la plej bonan intencon; mia rifuzo ne estis ia heroaĵo de mia flanko, ĉar agi alie mi ne povis«. Kaj d-ro Z. konstatas, ke jam kelkafoje, kiam li opiniis, ke venis la ĝusta tempo, por fari la revizion de esperanto, li mem elpaŝis en lojala formo kiel iniciatinto, sed, ke li tuj, kiam li konvinkiĝis, ke tio alportos al la afero malbonon, retiris sin malgraŭ tio, ke oni penis allogi lin al reformoj per mono Ni reproduktas la komunikon de d-ro Z., ĉar estas bone per publika laŭvera klarigo ĉesigi la vastigadon de fantazioplenaj legendoj, multe da kiuj rondiras tra la mondo. *Hkb*.

Pri „Tutmonda jarlibro esperantista“ redaktata de s-o Chavet kaj eldonata de f-mo Hachette oni sciigas, ke ĝi ne aperos plu. La jarlibro povis esti tre utila kaj grava helpilo al esperantistoj, sed bedaŭrinde ĝi ne estis plenumanta sian bonan taskon tiel, kiel ĝi devis kaj povis. La libro, kiu konsumis multe da laboro kaj mono, enhavis tro multajn erarojn, mankojn kaj malverojn kaj tiamaniere ĝi fariĝis senvalora danke kelkajn mensogemajn kaj trompemajn kunlaborantojn kaj helpantojn, kiuj senkonscience malbonuzis la kredemon kaj senzorgemon de la redaktinto. Ni ne scias, ĉu tiuj sentaŭgaĵoj kaj bubaĵoj de tiaj kelkaj informintoj estas direkta kaŭzo de la malapero de la jarlibro, sed certe ni ne eraras opiniante, ke tiuj »laborantoj por nia sankta afero« maldirekte mortigis tiun ĉi eldonaĵon. Ni sincere bedaŭrus la morton de tiu eldonaĵo, se ĝi estus efektiviginta sian taskon, sed en la nunaj cirkonstancoj ni devas akcepti tiun ĉi fakton kun meritita »Requiescat in pacem« . . . *Bšk*.

Ideoj de d-ro Zamenhof kaj „B. u. e.“ »Leginte pri la ideoj de nia Majstro, ni rememoriĝu, en kia grado ili estas plenumitaj ĉe bohemaj esperantistoj« skribis »Č. č. e.« (V, 3). Nu bone, ni komparu — kion »Č. č. e.« forgesis fari: la aŭtoro citas, ke d-ro Z. (en »Č. č. e.« kompreneble »nia Majstro« kun granda M) »rekomendas tradukadi la naciajn klasikulojn« kaj s-o Kühnl tradukas — »Sherlock Holmes en servo de la hispana trono«. Jen, kiel s-o K. plenumas la ideojn de d-ro Z.! Senvalora humoraĵo de moravia ĵurnalisto estas verko, kiun la ĉefa reprezentanto de »B. u. e.« prezentas al la tutmonda esperantistaro kiel montraĵon el la bohema literaturo!... Difficile est satiram non scribere... *Bšk*.

LA REVUO DE L'ESPERANTISTA GAZETARO.

Nomaro de ĉiuj esperantistaj gazetoj. Adresaro de la gazetoj ricevataj de la redakcio de »Bohema esperantisto«. (R = redakcio, A = administracio, Mon = monata, prezo por la tuta jaro.) Redaktis *Hmd.*

Esperantaj gazetoj. — *Oficiala gazeto esperantista.* R & A: Paris (Francujo), rue de Clichy 51. Mon. Sm 1·90. — *Lingvo internacia.* R & A: Paris (Francujo), rue Lacépède 33. Mon. Sm 2·00. — *La Revuo.* R & A: Paris (Francujo), bvd. St. Germain 79 (Hachette et Cie). Mon. Sm 2·38. — *Esperanto.* R & A: Genève (Svisio), rue de la Bourse 10. Duonmon. Sm 2·00. — *La Simbolo.* R & A: Tacoma (Wash., Usono), Post Office Box 1020 (Symbol Publishing Co). Mon. Sm 2·50. — *Danubo.* R & A: Bucuresti (Rumanujo), str. J. C. Bratianu 5. Mon. Sm 1·40. — *La Esperantisto.* R & A: Leipzig (Germanujo), Kochstr. 61. Mon. Sm 0·74. — *La Marto.* R & A: Graz I (Stirio-Aŭstrio), Burgring 12. Mon. Sm 2·50. — *Monato.* R & A: Leipzig (Germanujo), Aŭgustenstr. 17 (Eldonejo Esperanto). Mon. Sm 2·00, — *La Spritulo.* R & A: Dresden-Blasewitz (Germanujo) Tolkenwitzerstr 20. Mon. Sm 1·20. — *Internacia socia revuo.* R & A: Haag, 's Gravenhage (Nederlando), Weinmastraat 225. (J. L. Bruijn). Mon. Sm 1·40. — *Bulteno de Libera penso.* R: Sens (Francujo), R. Deshays. A: Antwerpen (Belgio), Kl. Beestr. 45. Mon. Sm 1·00. — *Juna esperantisto.* R & A: Paris (Francujo), rue Lacépède 33. Mon. Sm 1·00. — *Internacia pedagogia revuo.* R & A: Bystřice-Hostýn (Moravio-Aŭstrio), Komenského (Th. Cejka). Kvaronjara. Sm 2·00. — *Internacia medicino.* R & A: Dresden-Kötschenbroda (Germanujo). Mon. Sm 3·00. — *Voĉo de kuracistoj.* R & A: Lwów (Galicio-Aŭstrio), Ul. Sniadeckich 6. Mon. Sm 2·00, — *Internacia stenografia gazeto »Gabelsberger«.* R & A: Dresden 20. (Germanujo). Mon. Sm ? — *Fervoja esperantisto.* R: Parennes (Sarthe, Francujo), Stacio (Bontemps) Mon. Sm 1·00. — *La Barbiro.* R & A: Wien III.-2. (Aŭstrio), Hoernesstr. 24. (V. Jaroš). Kvaronjara. Sm 0·42. — *La Informanto.* R & A: Magdeburg (Germanujo), Schroterstr. 68. (H. J. Hoen). Mon. — *Esperanta ligilo.* — *Dia regno.* — *Espero katolika.* — *Internacia scienca revuo.* — *Nederlanda katoliko.* — *Tra la filatelio.* — *Universo.* — *Internacia polica bultono.* — **Esperanto-anglaj gazetoj.** — *The British Esperantist.* R & A: London WC (Anglujo), High Holborn 133—136. Mon. Sm 1·50. — *Eŭropa kristana celado.* — *La esperanta instruisto.* — *La Londona gazeto.* — *Amerika esperantisto.* — *La Espero.* — **Esperanto-bohemaj gazetoj.** — *Český esperantista (Bohema esperantisto).* — *Časopis českých esperantistů.* — **Esperanto-bulgara gazeto.** — *Semo.* — **Esperanto-dana gazeto.** — *Dana esperantisto.* R & A: Kopenhago (Danujo), Bredgade 35. Mon. Sm 2·00. — **Esperanto-finna gazeto.** — *Finna esperantisto.* R & A: Helsinki (Finlando-Rusujo), Kaupiask 11. Mon. Sm 1·20. — **Esperanto-francaj gazetoj.** — *Franca esperantisto* (L'Espérantiste français). R: Paris (Francujo), bvd. Magenta 46 (F. de Ménil). A: Versailles (Francujo), avenue de Sceaux (G. Warnier). Mon. Sm 1·48. — *Le Monde espérantiste,* R & A: Paris (Francujo), rue Sophie-Germain 3. Mon. Sm 1·00. — *Paris esperanto.* R & A: Paris (Francujo), rue de l'Arbre-sec 21. Mon. Sm 0·60. — *Normanda stelo.* R & A: Ruen (Francujo), rue de la Vicomté 41. Mon. Sm 0·80. — *Sarta stelo.* R & A: Le Mans (Francujo), rue de la Mariette 3. Mon. 0·40. — *Ardena stelo.* Charleville (Francujo), rue Baron Quinart 40. Mon. Sm 0·60. — *Bulletin officiel de S. f. p. p. E.* R & A: Paris (Francujo), rue Lacépède 33. Mon. Sm 0·60. — *La Dek-sepa.* Paris (Francujo), bvd. Pereire 179 (H. de Coppet). Mon. Sm 0·40. —

L'Espérantiste catholique. — *Norda gazeto.* — *La Movado.* — **Esperanto-franc-germanaj gazetoj.** — *Juneco.* R & A: Paris 6 Francujo), rue de Vaurgirard 55. Mon. Sm 1·40. — *Svisa espero.* — **Esperanto-flandra-franca gazeto.** — *Belga esperantisto.* R: Antwerpen (Belgio), Arendstraat 26. A: Antwerpen (Belgio), Beerstraat 45. Mon. Sm 1·90. — **Esperanto-germanaj gazetoj.** — *Germana esperantisto.* R & A: Berlin SW (Germanujo), Lindenstr. 18./19. Mon. Sm 1·50. — *Germana esperanto-gazeto.* R & A: Magdeburg (Germanujo), Kaiser Friedrichstr. 1. Mon. Sm 3·50. — *German-aŭstria esperantisto* (Deutsch-österreichischer Esperantist). R: Wien VII. (Aŭstrio), Kaiserstr. 10. A: Wien VI. (Aŭstrio), Dürerg. 19. Dumon. Sm 1·25. — *Rund um die Welt* (Ĉirkaŭ la mondo). R: Praha-Vinohrady (Prag-Weinberge, Bohemujo-Aŭstrio), Nerudova ul. 4 (prof. Sgf. Lederer). — *Eĥo esperantista.* R & A: Berlin SW. (Germanujo), Dessauerstr. 1 (Echo). Mon. Sm 6·00. — *Mitteilungen des N. E. V.* R & A: Hamburg (Germanujo), Grindelallee 5-11. Mon. — *La Instruanto.* R & A: Berlin SW 68, Lindenstr. 18-19 (Möller & Borel). Mon. Sm 1·00. — *Vespera horo.* — **Esperanto-greka gazeto.** — *Greklingva esperantisto.* R & A: Samos Azia Turklando), Samosa esp. societo. Mon. Sm 1·20. — **Esperanto-hispanaj gazetoj.** — *Gazeto hispana.* R & A: San Fernando (Cádiz, Hispanujo), str. Muñoz Torrero 10. Mon. Sm 1·20. — *Nova sento.* R & A: Bilbao (Hispanujo), str. Jardines 7. Mon. Sm 0·90. — *Antaŭen esperantistoj!!* R & A: Lima (Peruo, Ameriko), Apartado 998. Mon. Sm 1·20. — *Helpa lingvo* (Lengua auxiliar). R & A: Cordóba (Rep. Argentino), Colón 88. Mon. Sm 1·00. — *Esperanta penso.* R & A: Santiago-Chile (Ĉilio, Ameriko), Casilla 2850. Mon. Sm 1·50. — *Cuba esperantista.* R & A: Habana (Kubo), Apart. 1324. Mon. Sm? — *Kolumbia stelo.* R & A: Cúcuta (Kolumbia, Sud-Ameriko). Mon. Sm 0·50. — *La Du steloj.* — *Meksika stelo.* — *Verda stelo.* — *Malgranda revuo.* — **Esperanto-holandaj gazetoj.** — *La Holanda pioniro.* R & A: Hago (Holando), Prinsestr. 48. (J. L. Bruijn. Mon. Sm 0·83. — *Laborista esperantisto.* R & A: Hago Nederlando), Falckstraat 175. (R. Coomans). Mon. Sm 0·60. — **Esperanto-itala gazeto.** — *Itala esperantisto.* R & A: J. E. Palermo (Italujo). Dumon. Sm 1·20. — **Esperanto-japana gazeto.** — *Ĉiumonata samideano.* — **Esperanto-katalunaj gazetoj.** — *Kataluna esperantisto.* R & A: Sabadell (Barcolona, Hispanujo), str. Gracia 12. Mon. Sm 1·18. — *Tutmonda espero.* — **Esperanto-kroata gazeto.** — *Kroata esperantisto.* R & A: Zagreb (Kroatujo), Zrinjski trg. 16. Mon. Sm 1·91. — **Esperanto-magiaraj gazetoj.** — *La Verda standardo.* R & A: Budapest IX. ker. (Hungario), Üllöe-út 59. sz. Mon. Sm 2·14. — *Hungara studento.* R & A: Budapest VII. (Hungario), Alpár-utca 8. sz. Mon. Sm 0·75. — **Esperanto-norvega gazeto.** — *Norvega esperantisto.* (Den Norske esperantist). R & A: Kristiania (Norvegujo), Stolmakergt 6.-IV. Dumon. Sm 1·10. — **Esperanto-pola gazeto.** — *Pola esperantisto.* — **Esperanto-pol-germana gazeto.** — *Gestudentaj interesoj.* R: Luhačovice (Moravio-Aŭstrio), Joža Mareš. A: Kraków (Galicio-Aŭstrio), Długa 11. (Ed. Žatecky). Kvaronjara. Sm 1·00. — **Esperanto-portugala gazeto.** — *Brazila esperantisto.* R & A: Rio de Janairo (Brazilio, Sud-Ameriko), rua Sete de Setembro 195. Mon. Sm 2·00. — **Esperanto-rusaj gazetoj.** — *La Ondo de esperanto.* R & A: Moskva (Rusujo)) Tverskaja 26. Mon. Sm 2·12. — *Riga stelo.* R & A: Riga (Rusujo), Krebsstr. 11. Mon. Sm 2·50. — **Esperanto-serba gazeto.** — *Serba esperantisto.* R & A: Belgrado (Serbujo), Pop Lukina 4 (ing. Dr. M. Andonovic). Mon. Sm 2·00. — **Esperanto-svedaj gazetoj.** — *Esperanto-Folket.* R & A. Hälsingborg (Svedujo), G. H. Backman. Mon. Sm 1·50. — *Sveda esperantisto.*
